

1-2

1980

MONATA REVUO
FONDITA
EN JARO 1903

OFICIALA ORGANO
DE I.K.U.E.
INTERNACIA
KATOLIKA UNUIGO
ESPERANTISTA



**ESPERO
KATOLIKA**

INTERNACIA KATOLIKA UNUIGO
ESPERANTISTA*Honora Prezidanto:*

Sac. Alfons Beckers
Rozenlaan, 5
B-3950 Beringen (Belgio)

Prezidanto:

Sac. Duilio Magnani
viale C. Zavagli, 73
I-47037 Rimini/Forlì, Italio

Vicprezidantoj:

Sac. Roger Degrelle, 11 cours Léopold, F-54042
Nancy Cedex, Francio;
Sac. Józef Gotter, Trzebnice 113, PL-59.312
Chocianowicz, Pollando

Sekretario:

Antonio De Salvo

Kasisto:

Sac. Felice Ruaro, I-37010 Costermano (Verona),
Italio

Estraro:

A. Beckers, R. Degrelle, A. De Salvo, R. Forycki,
J. Gotter, H.J. Kindler, J. Kondor, J. Korytkowski,
F. Ruaro, J. Zielonka

Plenumkomitato:

Aŭstrio: W. Mudrak; *Belgio:* E. Paesmans; *Ĉeĥo-
slovakio:* J. Pastrnakova, M. Šváček; *Francio:* L.
Bourdon; *F.R. Germanio:* B. Eichkorn; *Hispanio:*
M. Casanoves; *Hungario:* E. Stancz; *Italio:* A. Cic-
canti, S. Giacchino, G. Pisoni; *Nederlando:* S.P.
Smits; *Pollando:* J. Korytowska, J. Kos, B. Sobol;
Svislando: F. Bommer; *Usono:* A. Herschel

Centra Oficejo:

Via Berni, 9
I - 00185 Roma (Italio)
tel. (06) 7588388
poŝta konto 23290000
Direktoro: Antonio De Salvo

Oficiala organo:

Espero Katolika

Kotizo por 1979:

20 svisaj frankoj aŭ egalvaloro

Registriĝo ĉe la Tribunalo de Romo

(Registrazione presso il Tribunale di Roma)
n. 17138, 11-2-1978

Respondeca Direktoro (Direttore Responsabile):

Antonio De Salvo
C.P. 4017, I-00100 Roma Appio (Italio)
tel. (06) 780782 (vespere)

Presejo (Tipografia):

ROTATORI
Viale Manzoni, 22/b - Roma

Sur la kovrilo: Fratino Maria Irma Bettegatti, Misii-
stino de la Sennakula Reĝino de la Paco, 48-jara,
plenumas paŝtistan agadon en Megolo, malgranda
vilaĝo de Piemonto (nord-okcidenta Italio). Eble ŝi
ne estas la unua en la mondo, tamen la afero estas
interesa, ĉar Fratino Maria estas, iusence, parokestri-
no: fakte, kvankam ŝi rajtas nek celebri Meson nek
konfespreni, ŝi zorgas pri ĉiuj aliaj paŝtistaj agadoj,
favore al siaj 350 « parokanoj » (foto Ansa).

ENHAVO

- 3 La Papo ne salutis (A. De Salvo)
- 4 Kial oni ne ŝanĝis? (A. De Salvo)
- 4 Heroldo de Esperanto
- 5 Ekumenaj informoj
- 7 Reveno (V. Dall'Acqua)
- 7 Ekumena propono (D. Magnani)
- 8 Forto kaj kuraĝo
- 9 Asociaj notoj
- 10 Rehonorado de Galilei (Carandina)
- 11 Radio-programoj el Romo (A.D.S.)
- 12 Ni gratulas
- 12 Ni funebras kaj kondolencas
- 13 Katolika horizonto
- 17 Papaj preĝintencoj por januaro
- 17 Papaj preĝintencoj por februaro
- 18 Legantoj skribas (H. J. Kindler-Trik-
sini, G. Noske)
- 19 Lingvaj problemoj en la Eklezio
- 21 Pasis tri jaroj
- 22 Polaj katolikaj Esperanto-aranĝoj en
1980 (J. Zielonka)
- 23 Ni dankas
- 24 Landaj reprezentantoj de IKUE

*La bildoj de ĉi tiu numero estis aŭfable liveritaj
de la itala Registaro (Presidenza del Consiglio dei
Ministri) kaj de E.P. Tic (Pollando/Aŭstrio).*

Periodico culturale - gruppo III - pubbl. inf. 70% -
lire 600.

Kultura periodaĵo - monata - malpli ol 70% da
reklamo - 600 liroj.

LA PAPO NE SALUTIS

Niaj esperoj ne plenumiĝis: la Papo ne salutis en Esperanto je Kristnasko.

Plej probable, lastmomente io okazis, kio ŝanĝigis la programon (kelkajn tagojn antaŭ Kristnasko, komisiito de la Sankta Seĝo petis de P. Jacobitti Esperantlingvan tradukon de la teksto de mallonga saluto). Estas supozeble, ke tiu nekonata evento estis kaŭzita de la opinio, ke la Esperantistoj volas forigi latinon el la Eklezio, kio, en si mem, estas malvera (kvankam ekzistas ankaŭ kelkaj radikalaj Esperantistoj, kiuj tiel misopiniis): ne ŝajnas sensignife, ja, ke la Papo ne nur ne salutis en Esperanto, sed ankaŭ aldonis specifan konsideron, parolante en itala lingvo, pri «*latino, kiu estas la komuna lingvo de la okcidenta Eklezio*».

La Papo, en si mem, estas favora al Esperanto; sed, kiel mi jam atentigis aliloke, la Papo ne estas la tuta Eklezio, kaj, precipe, la Papo ne povas simple neglekti la starpunktojn de la roma Kurio. Pro tio, anstataŭ riproĉi al Johano Paŭlo dua, ke li ne salutis en Esperanto, ni, prefere, *informu* lin kaj la Kurion pri la efektivaj celoj de la katolikaj Esperantistoj, kiuj ne estas la anstataŭigo de latino por la oficialaj ekleziaj rilatoj, sed la pli facila interkompreniĝo de la katolikoj tra la tuta mondo pere de lingvo pli facila ol tiu latina. Kaj ni informu, en sinteza kaj ne altruda formo, pri la servo de la katolikaj Esperantistoj al la Eklezio, en la paŝtista kampo. Tion ni faru per leteroj adresitaj *rekte al la Papo, en naciaj lingvoj*.

La prezidanto de IKUE, Sac. Duilio Magnani, tiel skribis al la Papo, en itala lingvo, 25.12.79:

«*Beatega Patro,*

mi humile alvokas, en ĉi tiu Kristnaska tago, Vian komprenemon de Patro, imagante la multajn problemojn kaj zorgojn, kiuj okupas Vin.

Mi ne estis iluziiginta, sed sincere mi havis kelkajn esperojn, koncerne la akcepton de nia propono uzi ankaŭ Esperanton en la kristnaskaj bondeziroj al la tuta mondo, laŭ nia letero de 15.11.79.

La milionoj da esperantistoj certe ne celas anstataŭigi la latinon, oficialan lingvon de la Eklezio kiel Via Sankteco volis prave substreki, sed ili atendas, ke estu eble pasi, de la laŭdaj kaj kuraĝigaj vortoj ricevitaj flanke de ĉiuj Plejsupraj Pontifikoj, de Pio deka ĝis Via Sankteco, al la praktika uzado de ĉi tiu internacia lingvo Esperanto, kvazaŭ por logike kroni la certe signifoplenan, sed memkompreneble nekompletan, aron da naciaj lingvoj uzataj por la kristnaskaj aŭ paskaj bondeziroj al la unuopaj popoloj. Des pli ke Esperanto estas unu el la lingvoj uzataj de Vatikana Radio.

Sankta Moŝto, se estas certe, ke kiel respektoplenaj filoj, kiaj ni deziras esti, ni ne povas formuli iun ajn pretendon pri la deziro de ni esprimita al Vi, tamen ni ŝatus koni la motivojn de la Patro. Ĉu ni estas malsaĝuloj?

Utopiuloj? Ĉu la peto estas tro frua? Ĉu la antaŭjuĝoj de aliaj bremsas? Ĉu estas ĝuste, ke ni daŭrigu nian proponon radikale alternativan kompare kun tiuj proponitaj kaj spertitaj tra la jarcentoj, nome la uzo de naciaj lingvoj, ĉiam ligitaj al la "povo", kiel rimedo de internacia interkomunikado?

Beatega Patro, mi volus doni respondon sinceran kaj motivitan al la multnombraj leteroj, kiuj daŭre demandas de mi, kial nia Internacia Asocio de Katolikaj Esperantistoj ne proponas al la Sankta Patro la uzon ankaŭ de Esperanto. Ĉu mi povas esperi je Via Patra respondo? Temas pri peto, kiun mi kuraĝas fari kun fida respekto, kun la celo plibone servi al la Eklezio, pere de nia tutmonda Esperanto-movado, valorigante ĉion bonan kaj novan en la homa progreso, harmonie kun la dua Vatikana Koncilio.

Bonvolu akcepti min kiel humilan servanton de la Eklezio, kaj doni al mi Patran kaj Apostolan Benon. De Via Sankteco dev.ega

*Sac. Duilio Magnani
Prezidanto de IKUE »*

Antonio De Salvo

KIAL ONI NE ŜANĜIS?

Multaj bedaŭros, ke ĉi tiu numero de EK 1980 (samkiel kelkaj aliaj en estonteco) aperas kun kovrilpaĝo de pli frua periodo, anstataŭ kun nova koloro. Ankaŭ mi bedaŭras, sed post longa pripenso, mi konkludis, ke la limigitaj financaj rimedoj de IKUE ne permesas, ke oni simple forjetu la kovrilpaĝojn restintajn de antaŭaj jaroj.

Aliflanke, estas neeviteble, ke ioma kvanto da kovrilpaĝoj restu ĉe la fino de ĉiu jaro: fakte, ĉe la jarkomenco oni ne povas precize diveni, kiom da kovrilpaĝoj oni bezonos (ĉar oni ne scias precize, kiom da kajeroj aperos, kaj kiom da kovrilpaĝoj difektiĝos dum stokado kaj presado). Tial, oni devas pretigi, jarkomence, iom pli altan kvanton da kovrilpaĝoj, ĉar la laborkostoj tiel multe influas, ke fari duan eldonon de la sama paĝo dum la jaro, en rilato kun pli precize difinitaj bezonoj, kostas pli multe ol forĵeti, eventuale, superflue pretigitajn paĝojn.

Mi fidas je la komprenemo de la abonantoj de EK.

Antonio De Salvo

HEROLDO DE ESPERANTO

La plej ofte aperanta sendependa Esperanto-gazeto (17 numeroj jare) aperas ekde 1920 (fondinto Teo Jung). Jarabono 440 belgaj frankoj, aŭ 30 ned.guld., aŭ 28 germ. markoj, aŭ egalvaloro.

Redaktorino Ada Fighiera Sikorska. Nova adreso: calle de Juan Ramón Jiménez 28, 6^o A, Madrid, Hispanio.

EKUMENAJ INFORMOJ

● La Prezidanto de Egiptio, Sadat, 19.11.79 metis la angulŝtonon de grandioza interreligia komplekso en Sankta Katarina de Sinajo, dediĉita al la tri kultoj islama, kristana kaj hebrea. La komplekso konsistos el moskeo, biblioteko, preĝejo kun tri fakoj (por la celebrado de katolikaj, ortodoksaj kaj protestantaj diservoj), kaj sinagogo. Kvin grandaj turoj superregos la konstruaĵon: du surhavos krucon, la tria la islaman lunarkon, la kvara la stelon de Davido, kaj la kvina simbolan prezenton de la unueco de la tri grandaj monoteistaj religioj.

● La Eklezioj katolika, luterana kaj episkopa en Brazilo reciproke agnoskis la bapton, per akordo valida por la tuta lando. En la dokumento, la tri Eklezioj « dankas Dion pro ĉi tiu baza ligo, petas la asiston de la Sankta Spirito por superi la disiĝojn, kaj sin devigas daŭrigi la iradon al perfekta kristana unueco ».

● La Ortodoksa Eklezio en Usono komencis sisteme labori por evangelizi neblankulojn: tiucele, la Patriarko de Aleksandrio en Egiptio kunordigas la misiajn agadojn, laŭ la modelo de la katolika Kongregacio por la Evangelizado de la Popoloj (la iama « *Propaganda Fide* »).

Oni pristudas la eblecojn de pli vasta enkonduko de afrikaj tradicioj en la liturgion, des pli ke, laŭŝajne, la nuntempa interesiĝo de multaj uson-afrikanoj pri la Ortodoksa Eklezio estas ligita ĝuste al la riĉeco de la ortodoksa liturgio.

Ĝis nun, rus-ortodoksoj agadis en Usono nur ĉe rusaj elmigrintoj (la iama agado en Alasko ĉesis tuj post la cedo de tiu Lando al Usono fare de la Caroj).

● Parolante, 23.11.79, al la partoprenantoj en Ekumena Renkontiĝo iniciatita de la Sekretariato por la Unuiĝo de Kristanoj, Johano Paŭlo dua diris, ke la vorto «ekumenismo» ne devas elvoki malpravajn timojn pri la adaptiĝoj necesaj por efektiva renoviĝo de la Eklezio. « *Des malpli — li aldonis — ekumenismo estas pasporto al indiĝentismo, aŭ al neglektado de ĉio, kio estas esenca en nia sankta tradicio. Kontraŭe, ĝi estas instigo, vokado por ke ni agu, sub la gvido de la Sankta Spirito, por la videbla kaj perfekta unueco en la kredo kaj en la amo, en la vivo kaj en la agado, de ĉiuj, kiuj deklaras sian kredon en la unika Sinjoro Jesuo Kristo* ». Tiucele, la Papo pledis por ke estu daŭrigata la teologia dialogo kaj la kunlaboro kun la aliaj Eklezioj kaj komunumoj, kiuj jam estis tiel fruktodonaj en la kampoj de la antaŭenigo de la socia justeco kaj de la homaj rajtoj, de la evoluigo kaj de la helpo al la mizeruloj.

Johano Paŭlo dua aparte substrekis du urĝajn taskojn: la sacerdotoj kaj la aspirantoj al la sacerdoteco aprecu la ekumanan dimension de sia

misio, kaj transdonu ties spiriton al la fideluloj; la religia instruado estu kunligita kun la celoj de ekumenismo, per seriozaj streboj ankaŭ de persona puriĝo, en la humileco kaj en la fervoro de la Spirito, por ke la unueco estu atingita kiam, kaj per la rimedoj, kiujn la Sinjoro volos.

La Sankta Patro ankaŭ insistis pri la paŝtista karaktero de la unuiga tasko. Dum kristanoj estas disiĝintaj, la predikado de la Evangelio estas malhelpata: la disiĝoj inter la kristanoj malfavoras la kredeblecon al la Evangelio kaj al Kristo mem. *«La disiĝo — diris la Papo — estas skandalo, malhelpo por la disvastigo de la Evangelio. Estas nia devo klopodi, per la graco de Dio, forigi ĝin kiel eble plej baldaŭ... Neniu malprave kredu, ke ĉi tiu laboro por la perfekta unueco de la kredo estas io duaranga, kion oni povas senfine prokrasti. La prava bezono de pacienco en la atendo de la horo de Dio neniam devos esti okazo de kontentiĝo pri la nuna stato de kredo-disiĝo».*

● Paca brakumo inter la patriarkoj de la Eklezio de Antiokio karakterizis, 16.12.79, la finon de la ekumenaj celebradoj, en Libano, memore al la 16-jarcenta datreveno de la morto de S. Bazilo la Granda.

Sur la maria monteto Harissa, apud la statuo de «Nia Sinjorino de Libano», ekumene renkontiĝis la patriarkoj greka-melĥita, maronita, armen-ortodoksa kaj armen-katolika, la reprezentantoj de la patriarkoj siri-katolika kaj grek-ortodoksa, kaj la apostola nuncio en Libano.

Dum la ceremonio, en la preĝejo dediĉita al S. Paŭlo, reciproka brakumo kunigis en la nomo kaj en la memoro de la «Granda Patro» de la Orienta Eklezio la estrojn de la kristanaj komunumoj, sopirantaj al unueco.

En la homilio, la katolik-melĥita patriarko de Antiokio Maksimo kvina Hakim memorigis, ke S. Bazilo estis «Granda» ankaŭ ĉar li komprenis la valoron de la vivo, kaj kapablis doni socian signifon al la kristana vivo. Fakte li konstruigis, apud Cezareo, la «Urbon de la malriĉuloj», kiun li provizis per multnombraj karitataj institucioj.

Okaze de ĉi tiu 16-jarcenta datreveno, aperis traduko en araba lingvo de la verko de S. Bazilo pri la Sankta Spirito, kiu kontribuis al la difino de la «Kredo» dum la Koncilio de Konstantinopolo.

● Deklaracio pri la komuna kompreno de la sakramento de bapto estis subskribita, en Aŭstralio, de la Katolika Episkopara Konferenco kaj de la Asembleo de la Unuiĝinta Eklezio. Temas pri unu el la fruktoj de la regulaj teologiaj interparoloj inter la du Eklezioj, post kiam, en 1977, Metodistoj kaj Presbiterianoj kuniĝis en la Unuiĝintan Eklezion. La teksto de la deklaracio ankaŭ pledas por daŭrigo de la teologia dialogo, por klarigita, kio ankoraŭ bezonas komunan pliprofundigon.

REVENO

Al lando praava,
post longa vojaĝo,
por vidi la lokojn
de sia junaĝo,
Li sola revenas
sen ia soleno.
Li grimpas pilgrime
al Jerusalemo,
alvenas vizite
al fama preĝejo
en kiu troviĝas
la sankta tombejo.
En ŝildo, sur pordo,
legiĝas notico:
kristanoj ĉi tien
eniru en vico,
ne mikse, sed nur laŭ
la kredaparteno:
por kult' ortodoksa
en frua mateno,

por rito melhita
en la posttagmezo
kaj rom-katolikoj
vespere por Meso.
Monaĥo gardisto
al tiu fremdulo
hezite senmova
sub tiu tabulo,
helpeme demandas:
Ĉu vi ne komprenas,
al ajn konfesio
ĉu vi apartenas?
Jam estas fiksita
por ĉiu la horo:
elektu la tempon
por via adoro!
Do, kio vi estas,
ho pia turisto?
Mi estas, Li diras,
Mi estas nur Kristo.

Vittorio Dall'Acqua

(El la bulteno 41/12-1979 de la Katolika Esperanto-Centro en Milano, Italio)

EKUMENA PROPONO

Mi proponas, ke:

- 1 — Ĉiu landa sekcio de IKUE klopodu organizi Esperanto-kursojn por la porpastraj seminarianoj, gimnaziaj kaj teologiaj, dum venonta somero 1980, ekzemple kiel feriperiodon.
- 2 — La landaj sekcioj, kiuj sukcesos tion fari, aranĝu, kun la helpo de IKUE, interŝanĝon de vizitoj inter la kursanoj, kaj, se eble, internacian kurson por progresantoj en unu el la koncernataj landoj, eldonon de faka interligilo, ktp.
- 3 — En tria momento, oni klopodu aranĝi internacian ekumenan feriadon por seminarianoj katolikaj, ortodoksaj, anglikanaj, protestantaj, ktp.

Duilio Magnani

FORTO KAJ KURAĜO

① Unu el la aspektoj, kiuj plej profunde trafis la observantojn de la vojaĝo de la Papo al Irlando kaj Usono, estis la forto kaj la kuraĝo, per kiuj, en siaj paroladoj, li alfrontis la plej urĝajn moralajn problemojn, kun plena kono de la modernaj starpunktoj kaj, samtempe, kun absoluta fideleco al la tradicia doktrino, indikante la solvon de la diversaj problemoj precize kaj klare, sen malcertecoj kaj ambiguaĵ sintenoj.

Johano Paŭlo dua sciis (kaj tion li diris al la usonaj episkopoj), ke *« se ni proklamas la veron en la amo, ne eblas al ni eviti kritikojn: nek eblas plaĉi al ĉiuj. Sed estas eble labori efektive por la bono de ĉiu. Pro tio ni estas humile konvinkitaj, ke Dio estas kun ni en nia ofico de vereco »*.

Baziĝante sur ĉi tiu dia asisto, li proklamis antaŭ ĉiuj, klerikaro kaj fideluloj, humilaj formetitaj popoloj kaj reprezentantoj de la plej grandaj nacioj, la fundamentajn principojn por la defendo de la vivo en ĝia pleneco kaj por la antaŭenigo de ĉiuj homaj rajtoj. Li proklamis la dignon de la homa persono kaj ĝian nelmezureblan valoron, senkonsidere pri rasaj aŭ etnaj devenoj; li energie rifuzis la subpremadon de la malfortuloj, la manipuladon de la neŝirmitoj, la forĵetadon de la disponeblaj aĵoj, la senhaltan sinarmadon, la nejustajn strukturojn kaj sociajn politikojn, kaj ĉiun formon de perforto kontraŭ la individuoj kaj la popoloj.

Aparte li alfrontis tiujn moralajn problemojn, kiuj pli strikte rilatas al la esenco de geedziĝo, al la bezonoj de familio, al la valoro de vivo. Li plurfoje reasertis la nerompeblon de la geedza ligo. Li konfirmis, ke seksu-mado estas home kaj morale bona nur en la kadro de geedziĝo. Li konfirmis la malhonestecon de la samseksaj rilatoj, samtempe pledante por komprenemo favore al tiuj, kiuj havas tiajn inklinojn. Li kondamnis kontraŭkoncipilojn. Li konfirmis la neatencendan valoron de ĉiu homa vivo ekde la koncipiĝo, kondamnante aborton. Simile li esprimis sin kontraŭ eŭtanazio, neakordigebla kun la respekto por la homa digno kaj kun la sankta valoro de la vivo.

● « Ofte la libereco de la volo kaj de la persono estas komprenataj kiel rajto fari ĉion ajn, akcepti neniun regulon kaj neniun devon... Sed Kristo ne instruas al ni tian interpretadon kaj praktikadon de libereco... Je la okuloj de Kristo, la libereco ne estas « libereco *el* », sed « libereco *por* ».

Oni ne povas pretendi retroirigi, por tiel diri, la Eklezion laŭlonge de la historia irado de la homaro. Sed ankaŭ oni ne povas tro memfide kuri antaŭen, al iuj manieroj travivi, koncepti kaj prediki la kristanan veron, kiuj ne baziĝas sur la totala instruo de la Koncilio, interpretata je la lumo de la Sankta Tradicio »,

(Johano Paŭlo dua al la kardinaloj, 5.11.79)

● Oni devas urĝe reagi kontraŭ opinioj, unuflankaj kaj misgvidaj, kaj oni devas kuraĝe kontraŭstari kelkajn zorgigajn fenomenojn, kiaj estas la forpreno de la privata vivosfero fare de la socio, kaj la perforto al la socio fare de la privatuloj. La rilato inter publikaj kaj privataj aferoj estas kerna en la sperto de la nuntempa homaro, ĉar en kelkaj landoj la jura sistemo antaŭvidas la elstarecon de la publikaj aferoj ĝis preskaŭa nuligo de tiuj privataj, dum en aliaj landoj oni subigas al la privataj interesoj eĉ fundamentajn bezonojn kaj interesojn de la kolektiva vivo. Bedaŭrinde, en ambaŭ sintenoj estas ĉiam la homo tiu, kiu suferas, en sia privata aŭ socia dimensio, pro la uzo de la leĝa povo kiel rimedo de superregado (de la individuo aŭ de la kolektivo) anstataŭ kiel rimedo de justeco.

(*Johano Paŭlo dua al la partoprenantoj en kongreso de katolikaj juristoj*, 7.12.79).

ASOCIAJ NOTOJ

● Ekde 1.1.80, Antonio De Salvo rezignis je la ĝisnuna tasko de Direktoro de « L'Esperanto », organo de la Itala Esperanto-Federacio. Tiel li povos dediĉi sin plimulte al « Espero Katolika », kaj, samtempe, li evitos tiun nevolan monopolon de la Esperanto-informado en Italio, kiu devenis el la fakto, ke li ankaŭ estis (kaj daŭre restas) redaktoro de la Esperanto-elsendoj de Radio Roma.

● En Hispanio, oni aĉetu la librojn de nia libroservo ĉe la Hispana Esperanto-Federacio (Dos de Mayo 4, Valladolid, Hispanio).

● La librojn de nia libroservo oni povas aĉeti, en Francio, rekte ĉe nia landa reprezentanto (Roger Degrelle, 11 cours Léopold, 54042 Nancy Cedex). Antaŭ ol pagi, oni atendu la fakturon; estos aldonitaj la sendokostoj. Oni diru, ĉu oni volas, ke la pakajo estu registrita.

La profito de la vendo de libroj, pere de nia franca reprezentanto, iros al nepagipovaj francoj, kaj al sendado de senpagaj ekzempleroj de « Espero Katolika ».

● La librojn de la libroservo de IKUE oni povas pagi ankaŭ en nacia valuto, al propra landa reprezentanto. Tio validas por ĉiuj landoj kun IKUE-representanto, *inkluzive de socialistaj landoj*.

● Por sendi monon al IKUE, se oni ne povas uzi la poŝtan konton (numero 23290000) aŭ poŝtan mandaton, oni sendu aŭ *italan* bankan ĉekon *pageblan en liroj kaj ĝireblan*, aŭ bankajn biletojn (ni akceptas ĉiujn negoceblajn valutojn).

REHONORADO DE GALILEI

Teksto de Carandina, traduko de Antonio De Salvo (laŭ Radio Roma)

Papo Johano Paŭlo dua proponis al la kleruloj, al la teologoj kaj al la historiistoj la totalan rehonoradon de Galileo Galilei, dufoje kondamnita de la « Sankta Oficejo », antaŭ tri jarcentoj kaj duono.

Papo Wojtyła preteriris la revalorigon, kiu jam estis farita de Paŭlo sesa kaj de la dua Vatikana Koncilio. Parolante la 10-an de novembro ĉe la Pontifika Akademio pri Sciencoj, antaŭ multaj Nobelpremiitoj, kardinaloj kaj diplomatoj, la Papo urĝigis profundan revizion de la proceso kontraŭ Galilei, kaj invitis la Eklezion mem lojale agnoski la maljustaĵojn, «*de kiu ajn flanko ili venas*», por ke estu definitive forviŝitaj «*la suspektoj, kiujn ĉi tiu afero daŭre enmetas en multajn spiritojn, kontraŭ fruktodona konkordo inter scienco kaj kredo, inter la Eklezio kaj la mondo*».

Papo Johano Paŭlo dua, kiu celebradis la unuan jarcenton de la naskiĝo de Albert Einstein, apudmetis la meritojn de ĉi tiu elstara sciencisto al tiuj de Galilei (ili «*karakterizis iun epokon*», diris la Papo); kaj li proponis ilin ambaŭ al la atento de la teologoj, cele al pli profunda studo.

«*La Eklezio — aldonis la Papo — plena je admiro pro la genio de Einstein, kiu montras la spuron de la kreanta Spirito, neniel enmiksiĝas en prijuĝon (pri kiu ĝi ne kompetentas) koncerne la doktrinon pri la grandaj sistemoj de l'universo; sed ĝi proponas ĉi tiun doktrinon al la pripenso de la kleruloj, por malkovri la harmonion, kiu ekzistas inter la scienca vero kaj tiu revelaciita*».

Rilate Galilei, «*kiu multe suferis*» (tiel diris la Papo) «*pro homoj kaj organoj de la Eklezio*», Johano Paŭlo dua certigis sian plenan subtenon por kompleta rehonorado: «*temas pri entrepreno — li diris — kiu povos honori la veron de la kredo kaj de la scienco, kaj malfermi vojon por estontaj kunlaboroj*». Poste, la Papo menciis kelkajn pecojn ĉerpitajn el la leteroj de Galilei, substrekante ilian harmonion kun la eldiroj de la Koncilio kaj de la eklezia doktrino koncerne la interpretadon de la Sankta Skribo: «*Ĉi tiu harmonio kontribuas krei favoran deirpunkton por la solvo de la afero*».

El la vidpunkto de principoj, la Papo proklamis, fine, ke la fundamenta scienco estas universala bonaĵo, kiun ĉiu popolo rajtas kultivi en plena libereco el ĉiu formo de internacia servuteco aŭ de intelekta koloniismo. En siaj aplikoj, krome, ĝi devas inspiriĝi al la amo, al la saĝeco kaj al la kuraĝo. «*Samkiel racio postulas religian liberecon — konkludis Papo Wojtyła, samlandano de Koperniko — tiel scienco plenrajte postulas liberecon de esploro*».

RADIO-PROGRAMOJ EL ROMO

El Romo, regulaj radio-elsendoj en Esperanto estas disaŭdigataj de la Itala Radio (RAI) kaj de la Vatikana Radio.

a) RAI elsendas en Esperanto jam de multaj jaroj (de 1935 ĝis 1941, kaj denove ekde 1950). Iam, estis oftaj elsendoj (en iuj periodoj, eĉ tri ĉiusemajne); poste, pro ŝpar-celoj kaj pro nesufiĉa premo fare de la esperantistoj, la elsendoj eĉ riskis malaperi, kaj pene oni sukcesis konservi po unu semajnan elsendon. La programo estas disaŭdigata nur per kurtaj ondoj, ĉar ĝi estas direktata ekskluzive al eksterlando, en la kadro de la zorgoj de la Ministra Prezidantaro por fari iom da propagando eksterlande.

Surbaze de konvencio, la itala Registaro donas ĉiujare difinitan sumon al RAI, kiu komplete prizorgas la realigon de la programoj kaj la koneksajn servojn (korespondadon, ktp.). Fine de ĉiu jaro, RAI devas raporti al la Registaro pri la farita laboro; la Registaro devus kontroli, ke la elsendoj estis fruktodonaj, precipe en rilato kun la kvanto kaj kun la enhavo de la alvenintaj korespondataĵoj. Praktike, tiu kontrolo estas tre ĝenerala; kaj, memkompreneble, RAI ne havas stimulon plibonigi siajn programojn, se tio kuntrenas pliajn kostojn, ĉar la kompenso estas jam antaŭe fiksita, sendepende de la rezultoj.

La tuta fako de la elsendoj al eksterlando estas sub la kontrolo ankaŭ de speciala Komisiono, konsistanta esence el parlamentanoj; al ĝi, ekzemple, oni devas turniĝi por modifi la horaron de la programoj.

La elsendo en Esperanto estas disaŭdigata ĉiun dimanĉon, de 21.00 ĝis 21.20 laŭ Mez-eŭropa tempo. Prizorgas ĝin Antonio De Salvo (pli frue, zorgis pri ĝi, tra la jaroj, Blasimme, Musella, familio Minnaja kaj Corsetti).

Ekde 1979, RAI ankaŭ pagas la tradukojn (el esperanto al la itala, kaj inverse) de la alvenantaj korespondataĵoj kaj de la koneksaj respondoj: entute, temas pri nemalŝatindaj sumoj.

La ĉefaj problemoj de la E-elsendo de RAI estas du: la programo estas nur malfacile aŭdebla en Italio mem (kaj ankaŭ eksterlande la aŭskulto ne estas facila), kaj la elsendo koincidas kun tiu en Esperanto de Vatikana Radio. La unua problemo ne estas solvebla, ĉar ĝi dependas de bazaj teknikaj kaŭzoj; por la dua oni atendas baldaŭan decidon (eble la elsendo okazos sabate).

La esperantistoj havas la devon subteni la programon per alskriboj. Fakte, radioelsendoj ne havas alian rimedon, por konstati la aŭskulton, ol kalkuli la nombron kaj konsideri la enhavon de la korespondataĵoj. La Esperanto-programo de RAI ricevas sufiĉe da korespondataĵoj kompare kun la aliaj programoj, tamen ankoraŭ nemulte por ke oni povu konsideri definitive firma la pozicion kaj la prestiĝon de la elsendo. La daŭra subteno estas bezonata ankaŭ por pruvi al la Registaro, ke la mono elspezata estas fruktodona (ĉiujare, la elsendo kostas plurajn milionojn da liroj).

b) Vatikana Radio elsendas en Esperanto ekde Pasko 1976, unue nur por kelkaj sekundoj, poste dum 10 minutoj, kaj nun dum 25 minutoj en ĉiu semajno (du elsendoj).

La programo estas prizorgata, ĉefe, de Patro Jacobitti, kiu ne nur ricevas neniun kompenson, sed eĉ eltenas rimarkindajn elspezojn.

La programo okazas sur mezaj kaj kurtaj ondoj kaj sur frekvenca modulado, per potencaj aparatoj, tiel ke ĝi estas sufiĉe bone aŭdebla en la tuta mondo; ĝi eĉ « kovras » la italan programon, kiu okazas samtempe kaj je tute proksimaj frekvencoj, dimanĉe.

Vatikana Radio ankaŭ utiligas (eĉ, tre amplekse) Esperanton en sia monata program-bulteno.

La Esperanto-sekcio de Vatikana Radio ricevas, ĉiujare, preskaŭ 4.000 korespondaĵojn, kaj tiel ĝi viciĝas unualoke. Tio, tamen, kaŭzas rimarkindan laboron (kiel dirite, tute senpagan) por la respondoj, kiuj estas ĉiam akurataj kaj diligentaj.

La ĉefa problemo de Vatikana Radio estas la fakto, ke P. Jacobitti estas maljuna, kaj oni ne vidas, almenaŭ momente, la eblecon de anstataŭanto. IKUE estas prizorganta la aferon, sed oni ne havas solvon submane.

Kompreneble, ankaŭ por Vatikana Radio validas la alvoko al la Esperantistoj skribe subteni sian stacion.

A. D. S.

NI GRATULAS

● De 21.9.79 ĝis 6.10.79, P. Albino Ciccanti turneis en Danlando, prelegante en diversaj medioj (Esperanto-kluboj, gimnazio, paroĉa grupo, katolika paroĉejo, Rotari-klubo).

● Ĉe la preĝejo de Patroj Dominikanoj (Maria Rotunda) en Vieno, Aŭstrio (Postgasse 4), estis denove pendigita, laŭ propono de s-ro Walter Mudrak kaj helpe de fratino Hermine de la Tria Ordeno, bela afiŝo kun kristnaska mesaĝo en kelkaj lingvoj, inkluzive de Esperanto: « *Gloro al Dio en la altoj kaj sur la tero Paco!* ».

NI FUNEBRAS KAJ KONDOLENCAS

† F-ino Guiomar A. de Aquino, delegitino de UEA pri katolikismo en São Paulo, *Brazilo*;

† P. Riccardo Lombardi, jezuito, fondinto de la Movado «Por Plibona Mondo» en Rocca di Papa apud Romo, *Italio*: li alparolis, en diversaj lingvoj, la partoprenantojn en la 29-a IKUE-Kongreso (1962).

† Elizabet Harangozo, Sac. Josip Ivić kaj Sac. Anton Makajnić, ĉiuj el *Jugoslavio*.

Ni preĝu por ili.

Al la familianoj, multajn kondolencojn.

KATOLIKA HORIZONTO

● Oni venas al Romo, pilgrime, ĉar en Romo troviĝas la tomboj de la ĉefapostoloj, kaj ĉar Romo estas sidejo de l' Papo, Vikario de Kristo. Tion substrekis Johano Paŭlo dua, kiu aldonis:

« La pilgrimantoj, kiuj venas al Romo, estas nek fremduloj nek gastoj, sed samcivitanoj de Petro kaj Paŭlo. En Romo, ĉiu baptito reiras al la origino de sia kristana identeco, kaj sentas sin hejme, ĉar la grundo de Romo estas trempita per la sango de la Martiroj, niaj praavoj en la kredo.

Por la kristanoj, precipe por la katolikoj, kiuj venas al Romo, ekzistas ankaŭ alia motivo, kiu ligiĝas ne tiom kun la pasinteco kiom kun la nuntempo. Ĉi tie, ja, havas sian sidejon la vivanta posteulo de Petro, kiu estas ne nur la estro de la roma diocezo, sed ankaŭ ŝarĝito de la universala ofico. Lia paŝtista funkcio, kiu daŭrigas tiun de la fiŝkaptisto de Galileo, konsistas en la paŝtado de la ŝafoj de Kristo, ne nur malebligante ilian ŝanceliĝon kaj dissolviĝon, sed ankaŭ favorante ilian kreskon kaj disvastiĝon ».

● Per solena rito en la Siksta Kapelo, la slovaka mons. Tomko estis konsekrita Episkopo, 16.9.79. Krom la Papo, ĉeestis 21 Kardinaloj, kvindeko da Episkopoj, pluraj familianoj, kaj multaj slovakoj, venintaj precipe el Okcidenta Eŭropo, Ameriko kaj Aŭstralio.

La rito, kiu daŭris preskaŭ du horojn, disvolviĝis en lingvoj latina kaj slovaka. Dum la homilio, eldirita parte en la itala kaj parte en la slovaka, la Papo diris, ke li volas aparte brakumi, per la memoro kaj la amo, la nacion kaj la tutan landon, kie la nova Episkopo naskiĝis.

La Papo ankaŭ adresis saluton en ĉeĥa lingvo « al la kara frata nacio ĉeĥa ».

Post la rito, Johano Paŭlo dua alparolis la ĉeestantojn en pola lingvo, kaj, interalie, kun bedaŭro li substrekis, ke neniu ĉeĥoslovaka Episkopo povis alveni al Romo por ĉeesti la ceremonion.

● Pridemandite de Vatikana Radio pri la misiistaj problemoj en Altvolta Lando (Okcidenta Afriko), kard. Paul Zoungrana deklaris 8.11.79:

« La plej urĝa problemoj, en la kampo de evangelizado, koncernas la disponeblecon de personaro. De ĉiuj vilaĝoj venas la peto ekkoni kristanisman, sed la personaro mankas, pro diversaj kaŭzoj: antaŭ ĉio, misiistoj maljuniĝas, kaj vokiĝoj estas nesufiĉaj. Estas vere, ke en Seminarioj la kandidatoj al sacerdotiĝo estas multaj, sed pluraj jaroj devos pasi, antaŭ ol ili estos ordinitaj. Ni havas laikajn katekistojn, sed la sperto pruvis, ke la agado de la sacerdote estas nepre necesa. Jen kial la « misio » estas daŭre aktuala.

Alia problemoj estas tiu de la homaj kondiĉoj de nia popolo, kiu postulas, ke kristanoj aktive engaĝu sin en la kampo de evoluo: sekeco, malsato, analfabetismo serioze kondiĉas la vivon de nia popolo.

Krome, oni ne devas forgesi la problemon de pliprofundigo de la kredo, des pli ke ni vivas en kontakto kun islamismo kaj kun diversaj ideologioj ».

● La Seminario de Bilbao (Hispanio), por la unua fojo ekde sia fondiĝo, gastigas malpli ol 50 seminarianojn, precize 44: temas pri zorgiga simptomo de la krizo de vokiĝoj, kiu trafis la lokan Eklezion. En la lastaj 10 jaroj, meznombro po 8 seminarianoj estis, ĉiujare, ordinitaj sacerdotoj; por la venonta jartrio oni antaŭvidas, ke ili estos, entute, maksimume 9.

⊕ La sacerdotaĵaj vokiĝoj kreskas en la diocezoj de Anglio kaj Kimrio (Britio). En 1979, ja, estis 150 la anoj de la grandaj Seminarioj, kvardekon plimulte ol meznombro en la tri antaŭaj jaroj. Krome, lastatempe 50% el la anglaj kaj kimraj seminarianoj persistas ĝis la sacerdotaĵo.

Nuntempe, Anglio kaj Kimrio disponas pri 3.800 diocezaĵaj sacerdotoj.

⊕ En Bulgario la Katolika Eklezio havas du diocezojn (Nikopolo kaj Sofio-Plovdiv) kaj la apostolan esarkejon de Sofio por la katolikoj laŭ bizanca rito. En tuta Bulgario ekzistas, krom du Episkopoj kaj unu Esarko, apenaŭ 51 sacerdotoj, kaj ĉirkaŭ 70 monaĥinoj.

La ĉefa eklezia problemoj en Bulgario estas la malfacilaĵoj por varbi novajn sacerdotojn. Tute mankas seminarioj, kaj do la anstataŭigo de la nunaj sacerdotoj (kies meza aĝo superas 60 jarojn) estas preskaŭ neebla. Oni antaŭvidas, ke se ne okazos novaĵoj, post 10 jaroj nur malmultaj pastroj povos ankoraŭ plenumi sian apostolan oficon.

⊕ Maria Pilar Subirà, vidvino de Sorribas, iĝis klaŭzura monaĥino en Berga apud Lerida (Hispanio). La afero ne estus eksterordinara, se fratino Subirà ne havus 83 jarojn, 8 gefilojn, multajn nepojn kaj kelkajn pranepojn. La familianoj amase ĉeestis la ceremonion.

⊕ Katolikoj en F. R. Germanio estas 26.880.000, kaj, malgraŭ malpliigo de preskaŭ 400.000 anoj en la lasta jardeko, ili konsistigas la plej multnombrian religian grupon en la Lando.

En la sama jardeko, la nombro de la sacerdotoj malkreskis 8,9%, la baptoj de novnaskitoj 34%, la funebraj ceremonioj 27,1%. Kontraŭe, kreskis 147% la baptoj de konvertiĝintoj pli ol 7-jaraj. La malpliigo de la baptoj de novnaskitoj respegulas la fortan malkreskon de naskiĝoj en FRG; la malpliigo de la nombro de tiuj, kiuj sin deklaras formale katolikaj, estas parte klarigebla per fiskaj konsideroj, ĉar en FRG tiu, kiu sin deklaras ano de iu Eklezio, devas pagi imposton, kiun la registaro destinas al la indikita Eklezio.

⊕ Iama universitata Profesoro 72-jara, vidvo kaj patro de 5 gefiloj, celebris sian unuan Meson 17.12.1979, en Cagliari (Sardinio, Italio).

La nova sacerdoto, Prof. Antonio Maria Spanedda, instruis mikrobiologion ĝis antaŭ du jaroj, kiam li emertiĝis. Vidvo de 25 jaroj, Prof. Spanedda realiĝis al la kredo post longa periodo de religia indiferenteco. Li estas konsiderata elstara figuro de sciencisto kaj honesta homo.

● En la lastaj 15 jaroj, triobligis la nombro de la studentoj pri teologio ĉe la Universitato de Salisburgo (Aŭstrio). Sed, antaŭ 15 jaroj, la studentoj pri teologio estis preskaŭ ekskluzive kandidatoj al sacerdotiĝo, dum, hodiaŭ, pli ol duono intencas resti laikoj. Simila tendenco evidentiĝas ankaŭ ĉe aliaj aŭstraj Universitatoj, samkiel ĉe tiuj de F. R. Germanio: rimarkinda estas la nombro de la studentoj pri teologio, sed malmultaj la kandidatoj al sacerdotiĝo.

● Sur la pavimo de la S. Petro-Baziliko en Vatikano estas markitaj la nomoj de 22 grandaj preĝejoj de tuta mondo, kun la indiko de la koncerna longeco, inter 101,19 metroj (S. Patrico en Novjorko, Usono) kaj 158,10 metroj (S. Paŭlo en Londono, Britio), por videble emfazi la grandiozecon de la S. Petro-Baziliko, kiu estas longa 186,36 metrojn.

La laste aldonita nomo de preĝejo estas tiu de la Baziliko de Gdansko (Pollando), dediĉita al Maria (103,50 m).

● La eventoj de Irano estas jam de kelka tempo sur la ĵurnaloj; sed kia estas la situacio de kristanismo en Irano? Oni povas diri, ke kristanismo havas, en tiu Lando, grandan pasintecon, modestan nuntempon, kaj nefacilan estontecon.

Laŭtradicie, estis la apostolo Tomaso la unua evangelizanto de tiu Lando, kie estis fonditaj kristanaj komunumoj, kiuj mirinde floris, tiel ke fine de la sesa jarcento ekzistis pli ol 40 episkopoj.

Ankaŭ nestorianismo vigle aktivis. En 1552 parto el la nestorianoj realiĝis al Romo, kun la nomo de «Katolika kaldea Eklezio». Dum nestorianoj restis proksimume 2.500, kaldeoj estas preskaŭ 18.000: sed, ĉar ili uzas la sirian lingvon en teologio kaj liturgio, ili estas konsiderataj fremduloj en sia lando.

Ekzistas, krome, en Irano, preskaŭ 8.000 armen-katolikoj, kies deveno ligiĝas kun S. Gregoro la Lumiganto (ĉ. en la jaro 288). Kontraŭe, armen-ortodoksoj estas, en Irano, 100.000, tio signifas duonon el ĉiuj iranaj kristanoj.

La latina katolika Eklezio ĉeestas en Irano ekde la 14-a jarcento, dank' al la misiistaj streboj de dominikanoj kaj franciskanoj; sed la unua latina ĉefdiocezo, tiu de Ispahan, estis starigita nur en 1629.

Ekzistas, krome, aliaj 17 religiaj konfesioj, grandparte protestantaj, kiuj eniris la Landon dum la lastaj 100 jaroj.

Ĉiuj kristanaj Eklezioj en Irano havas similajn problemojn: enurbigo de la fideluloj, manko de loka klerikaro, manko de kristana literaturo en persa lingvo, manko de Eklezio «iraneca».

Alia grava problemo estas la dialogo kun la ŝijaisma Islamo, praktikata de la plimulto el la 35 milionoj da irananoj: kompare kun sunaistoj, la alia granda islama tendeco, ŝijaistoj estis pli mistikaj kaj religiemaj, havas siajn «*martirojn*» kaj siajn «*sanktulojn*», kaj atendas la revenon de *Madhi*, la granda imamo naskiĝinta en 868.

● 2.400.000 geknaboj malpli ol 15-jaraj vivas nuntempe, en Eŭropo, en lando alia ol tiu devena, kiel filoj de gastlaboristoj. Pri tiuj geknaboj, pri ilia edukiĝo kaj pri ilia plena socia evoluo, diskutis en Strasburgo, en decembro 1979, la Katolika Komitato pri Migradoj.

Oni substrekis, ke la plena evoluo de tiuj gejunuloj estas serioze malhelpata de pluraj faktoroj, kiaj la nesufiĉa kleriĝo lerneja kaj faka, la limigitaj laboreblecoj, la sociaj antaŭjuĝoj, la sospiro de la gepatroj al iama reenpatriiĝo. Pro tio, la problemoj devas esti alfrontata kaj solvata, samtempe, de la ŝtatoj kaj de la sociaj fortoj, en la devenaj kaj en la gastigitaj landoj.

● En la grandioza scenejo de la Siksta Kapelo, kaj en la sugestia kadro de bizanca-slava rito, 13-11-1979 Johano Paŭlo dua konsekris episkopo la novan metropoliton de Filadelfio de Ukrainanoj (Usono), mons. Myroslav Lubachivsky. Kunclebris kard. Jozefo Slipyi kaj mons. Maksimo Hermaniuk, metropolito de Winnipeg de Ukrainanoj (Kanado).

Dum la homilio, la Papo diris, interalie: « *Mi deproksime konas la historion de via popolo, kaj de tiu Eklezio, kiu de jarcentoj estas ligita kun ĝi. De tie venas mia preteco hodiaŭ almeti miajn manojn, kune kun vi, tre respektindaj fratoj, sur tiun, kiun la Sankta Spirito vokas al la episkopa ofico* ».

Johano Paŭlo dua ankaŭ vigle laŭdis kardinalon Slipyi, « la plej eminentan estron de la ukraina Eklezio ». Adresante sin al li, la Sankta Patro diris: « *Ne nur la filoj kaj la filinoj de via popolo, sed la tuta Eklezio kaj la nuntempa mondo konas vian neordinaran ateston, kiun vi, per via mal-*



La konsekrado de Mons. Lubachivsky (foto Ansa)

facila vivo kaj aparte per via multjara kaptiteco, donis al Jesuo Kristo kaj al la Eklezio, naskiĝinta el Lia Kruco kaj Resurekto. Estas konsole ekvidi, ke nun vi estas ĉe ni, kaj ke vi povas dediĉi vin al la bono de via popolo, kiel la paŝtisto kiu daŭre oferas sian vivon por siaj ŝafoj, ekzilita el tiu Eklezio, kiu ekde 1596 daŭre estas en unueco kun la sidejo de Petro, fidele jam de preskaŭ 400 jaroj. Ĉi tiu fideleco, aparte dum la lastaj jarcentoj, estis kaj daŭre estas pagata per grandaj oferoj».

Kard. Slipyi, nun 87-jara, pasigis 18 jarojn en la koncentrejoj de Siberio. La maljuna purpurulo, kiu jam en la daŭro de la dua mondmilito estis senĉese persekutita de la naziaj okupantoj, estis arestita de la sovetaj aŭtoritatoj 11.4.1945, kaj nur en februaro 1963, dank' al la interveno de Papo Johano dudektria kaj de la usona Prezidento Kennedy, estis liberigita, kaj forpelita el sia patrolando. De tiam, li vivas en Vatikano.

● La jezuito Carlo Maria Martini, rektoro de la Gregoria Universitato, estis nomita de la Papo nova ĉefepiskopo de Milano (Italio), kiu estas la plej granda diocezo en la mondo (1113 parokoj kun 5.125.000 loĝantoj).

La ĝisnuna ĉefepiskopo, kard. Colombo (kiu, parenteze, ĉiam tre favore kondukis al Esperantistoj), deklaris pri tio: «*La Papo, plenumante pe-ton, kiun mi plurfoje faris, akceptis mian eksigon el la paŝtista ofico de ĉi tiu diocezo. La Sinjoro Jesuo, kiu ne volis senfina la vivon de la homoj sur la tero, eĉ ne tiun de siaj episkopoj, scias, ke por ĉiuj venas aĝo, kiam la fortoj laŭgrade foriras, kaj kreskas la bezono je enmemiĝo kaj ripozo. Kaj al la koro, kiu, kontraŭe, ne maljuniĝas, Li kapablas doni la pacon promesitan al la homoj de Lia favoro. Antaŭ 16 jaroj, Paŭlo sesa volis konfidi al mi la prizorgon de ĉi tiu Eklezio, kiu estis lia. Alia paŝtisto nun anstataŭas lin en la sama penado. La homoj sinsekvas, sed Jesuo Kristo estas la sama de hieraŭ, hodiaŭ kaj ĉiam*»

PAPAJ PREĜINTENCOJ POR JANUARO

Ĝenerala: por ke la unuiĝo de la kristanoj estu ĉiam pli aprecata kiel vojo kaj rimedo de evangelizado.

Misia: por ke la Eklezio tiel perfekte firmiĝu en sia interna unueco, ke ĝi sentigu sian allogon kaj sian influon al la nekristanoj.

PAPAJ PREĜINTENCOJ POR FEBRUARO

Ĝenerala: por ke la kristanoj, ĉiuj konkorde, ciam pli sindevigu fortikigi la unuecon de la homa familio.

Misia: por ke la religiuloj kaj la religiulinoj sekvu atente la evoluon de la misia paŝtista agado, kaj kapablu konformiĝi al ĝi.

LEGANTOJ SKRIBAS

Luksemburgo, 21.12.79

Estimata, kara sinjoro direktoro,

pri via letero koncerne la IKUE-kongreson en Luksemburgo, en EK 12/79, mi tute ne konsentas.

Vi ja scias, ke patro Bieldulski ne estis « la prezidanto por la kongreso », ke la estraro tute ne respondis pri la temo de la kongreso, ke la landaj reprezentantoj ne respondis al miaj informoj kaj ne reagis koncerne la afiŝojn kaj glumarkojn, per kiuj oni tre facile estus povinta gajni monon por la kongreso kaj ankaŭ por la landaj kaso, ke tiu « sufiĉe granda sumo » estis nur 1000 GM, kiujn mi devus repagi tuj post la kongreso kune kun la « gajno » ktp.

Do, tial mi protestas kontraŭ via priskribo de la preparado. Sed ne ekestu kvereloj inter ni.

Mi petas vin, publikigi tion en la revuo, kaj tamen restas amike

via

H. J. Kindler-Triksini

P. S. La « malmultaj personoj », kiuj preparis la kongreson, estis *du*: la sekretariino de la Centro kaj mi.

Mi tre volonte denove agnoskas, ke tiuj du nuraj personoj kapablis, malgraŭ multaj malfacilaĵoj, organizi brilan kongreson. Pri la resto, ĉar mi samopinias, ke oni evitu kverelojn, mi rezignas je repliko, kaj konsideras fermita la diskuton.

Antonio De Salvo

● En EK 9/79 kaj 10-11/79 aperis kelkaj fotoj pri la 38-a kongreso de IKUE. Ĉu estus eble, estonte, sub tiaj fotoj meti la nomojn de la fotitaj personoj, aŭ almenaŭ de la Esperantistaj eminentuloj (t.e. anoj de la estraro ktp)?

Gottfried Noske, F.R. Germanio

Mi volonte akceptas vian pravan sugeston. Tiucele, tamen, estas necese ke, miavice, mi estu informata pri la nomoj de la personoj, kiuj aperas en la fotoj sendataj por publikigo en EK.

Antonio De Salvo

LINGVAJ PROBLEMOJ EN LA EKLEZIO

● Nova hispanlingva traduko de Biblio estas distribuata en Usono, ĉe la katolikoj venantaj el la apuda Meksikio kaj loĝantaj precipe en la sudaj kaj okcidentaj Ŝtatoj. La teksto, aprobita de la latin-amerikaj episkopoj, havas la titolon « *Dios habla hoy* » (Dio parolas hodiaŭ), kaj estas distribuata de la Amerika Biblia Societo.

Lige kun tio, mons. Patrick Flores, ĉefepiskopo de San Antonio (Teksaso), substrekis la urĝan neceson de evangelizado de la meksik-devenaj usonanoj: « Multaj aliaj konfesioj — klarigis la ĉefepiskopo — prizorgas intensan varbagadon ĉe tiuj homoj, el kiuj ĉirkaŭ 15% ne plu praktikas katolikismon. Ili estas tiel malsataj pri la dia vorto kaj la preĝo, ke ili akceptas ĉiun ajn inviton adresitan tiucele ».

● Aperis en F.R. Germanio nova kritika eldono de la Nova Testamento, en la greka originalo. La verko estis prizorgita de spertula teamo, kiu laboris tiucele 25 jarojn, sub la gvido de Prof. Kurt Aland, de la Universitato de Münster. La spertuloj reviziis la konatan eldonon prizorgitan en 1898 de Prof. Eberhard Nestle, farante 2.000 korektojn. Por la nova eldono oni konsultis 5.300 manuskriptojn kaj 5.000 mikrofilmojn, kaj oni utiligis komputilon por difini la plej ĝustan grekan version de la biblia teksto.

● « *Kial geedziĝi preĝeje?* ». Ĉi tiu estas la titolo de volumo, kiun la klarretanaj misiistoj aperigis pasintjare en Usono, en lingvoj angla kaj hispana, en la kadro de la multnombraj iniciatoj por paŝtista prizorgado de hispanlingvaj usonanoj. Sur la kovrilo, la titolo en la hispana antaŭas tiun en la angla. La du tekstoj estis verkitaj rekte en la du lingvoj, sen traduko, kaj ili esprimas, esence, la saman enhavon, laŭ la respektivaj lingvo-uzoj kaj kulturoj. La aperigo de ĉi tiu volumo — klarigis la eldonintoj — estis decidita pro la granda nombro da dulingvaj familioj ĉe la 19 milionoj da hispanlingvaj usonanoj.

● La Episkopara Konferenco de Paragvajo (Suda Ameriko) aprobis la tekstojn de la Meso en lingvo *guarani*, kiuj nun atendas la definitivan rajtigon fare de la Sankta Seĝo.

Jam nun, en kelkaj paragvajaj diocezoj oni recitas en *guarani* la «Kredon», la «Patron Nian» kaj la «Gloron».

Guarani estas la nacia lingvo de Paragvajo, kune kun la hispana; parolas ĝin ĉiutage la kamparanaj loĝantaroj de la interna parto de la Lando.

● Tuj elĉerpiĝis, en Hindio, la unua katolika kompleta Biblio en lingvo *khasi*, parolata de preskaŭ 600 mil loĝantoj de la regiono Meghalaya.

La volumo, 2.300-paĝa, estis publikigita de la salezana eldonejo de Shillong. Pli frua eldono de Biblio en lingvo *khasi* estis publikigita antaŭ 89 jaroj, en 1891, de la presbiteriana misiisto John Roberts.

● Por la unua fojo, la Nova Testamento estis komplete tradukita en modernan araban lingvon. La traduko estis publikigita en Bejruto (Libano), de kie la teksto estos disvastigata ĉe la kristanojn de la araba mondo.

Intertempe, daŭre progresas la traduko en la modernan araban de la Antikva Testamento, kiun oni planas aperigi en 1982.

● En Liono (Francio) vivas 35.000 armenoj. Ili disponas, jam de pli ol unu jaro, pri Kultura Centro Katolika-Armena, kiu iniciatas kulturajn aranĝojn, kaj instruas, precipe al la junuloj, la lingvon, la historion, la literaturon kaj la ĉefajn elementojn de la armena civilizo, kun la celo « partopreni en la konstruado de pli bona mondo, ĉiam restante veraj armenoj kaj ĵaluze konservante la kredon kaj la tradiciojn de la prapatroj ».

● La Biblia Societo de Sudafrika Respubliko publikigis en moderna lingvo zulua la Evangelion laŭ Marko, la Agojn de la Apostoloj, la Leterojn de S. Paŭlo al la Efesanoj kaj la Psalmojn. La tekstoj estas kunmetitaj en unu sola volumo, titolita « La bona novaĵo de Dio », riĉe ilustrita per scenoj inspirigantaj al la vivo de la zulua popolo.

● Baldaŭ kompletigis la traduko de Biblio en kvin lingvojn parolatajn en Zambio (Afriko): bamba, biza ala, kinamvanga, kitonga kaj loza. La tradukaj laboroj daŭras jam de pluraj jaroj, zorge de la loka Biblia Societo.

La kristana komunumo de Zambio konsistigas proksimume 28% el la pli ol 5 milionoj da loĝantoj.

● Havas pli ol 400 jarojn la unua presejo en la lingvo tamila (Hindio). La ideo de tiu presejo estis lanĉita en 1575 de la jezuito Henriques, kiu, konante tiun lingvon, deziris aperigi en ĝi katekismojn, gvidilon por konfesprezo kaj priskribojn de la vivo de la Sanktuloj, por la uzado fare de la konvertiĝintoj. La iniciato realiĝis en 1578, en la urbo Punnakayal, zorge de alia jezuito, Baria.

● Dum la ĝenerala aŭdienco de 5.9.1979, Johano Paŭlo dua sin adresis ankaŭ en slovena lingvo al la fideluloj de la diocezo de Triesto (nordorienta Italio), kie ekzistas rimarkinda slovena minoritato. La Papo premisis, en itala lingvo, ke « *vizitante Petron en la persono de lia humila posteulo, oni konfirmas la principon de la unueco de la Eklezio, trans ĉiu natura disiĝo, ankaŭ etna...* ». Pro tio, li invitis ĉiujn « *formi ĉiam kune unu solan koron kaj unu solan animon, ne nur en la internaj sentoj, sed ankaŭ en la paŝtista kampo, tiel donante al la mondo lumoplenan ateston de solidareco, eĉ pli, de frateco* ». Poste, Johano Paŭlo dua aldonis, en la slovena: « *Mi estas tre ĝoja adresi min en ilia lingvo al la slovenaj pilgrimantoj, same venantaj el la diocezo de Triesto. Mi kore bondeziras, ke via originala kultura identeco, enigita en la urban kaj eklezian vivon, estu por vi kaj por ĉiuj vera kontribuo de spirita riĉeco* ».


● La laboroj de la kardinala kolegio, kiu kunvenis en Romo de la 5-a ĝis la 9-a de novembro, disvolviĝis laŭ ses lingvogrupoj: latina, itala, franca, angla, hispana kaj germana. Komence, la grupoj estis kvin, sed preskaŭ tuj oni aldonis tiun germanlingvan, pro la insistaj petoj de la koncernaj kardinaloj.

● La episkopo de Augsburg (F.R. Germanio) ordonis, ke en ĉiuj parokoj de la diocezo oni celebru Meson en latina lingvo almenaŭ po unu dimanĉon ĉiumonate. La episkopo, mons. Josef Stimpfle, substrekis, ke latino daŭre estas la oficiala lingvo de la Eklezio, kaj al latino oni ŝuldas la konserviĝon de multaj kulturaj valoroj. Dum la ĉiumonata Meso, ankaŭ la kantoj estu en latino, « *por pravi — skribis la episkopo — nian unuecon kun la Sankta Roma Eklezio* ».

PASIS TRI JAROJ

17.1.1977 tragika stratakcidento forprenis el niaj vicoj unu el la plej agemaj laborantoj por niaj esperantaj kaj katolikaj idealoj, patron Henrikon Paruzel. Tri jaroj pasis de tiam. La bezonoj de la vivo alvokis aliajn al la daŭrigo de la iniciatoj de P. Paruzel. La semo de li ĵetita ne pereis. Kaj ni, hodiaŭ, memorigas lin kun granda dankemo.

Certe niaj legantoj ĝojos sciante, ke jam de kelkaj monatoj la tombo de P. Paruzel estas en ordo (tiel ke ne plu validas la rimarkoj entenataj en EK 5/79, je p. 75).



La tombo de P. Henriko Paruzel

Konstantaj

- Bielsko-Aleksandrowice, preĝejo de S.J. Sankander, ĉiun 5-an dimanĉon de monato, je la 13-a h. Esperanto-diservo kaj poste amika kunveno en tiea katekizejo.
- Bydgoszcz, Ossolińskich 2, Patroj Misiistoj, ĉiun duan dimanĉon, je la 16,30 h. - Esperanto diservo kaj poste kultura programo en tiea katekizejo.
- Gdańsk, Elżbietanska 1, Patroj Palotanoj, en ĉiu lasta dimanĉo, je la 17-a h. Esperanto diservo, kaj poste amika kunveno en tiea katekizejo.
- Gliwice, Łużycka, preĝejo de S. Mikaelo, ĉiun kvaran dimanĉon, je la 15-a h. Esperanto diservo, kaj, poste, kultura renkontiĝo en tiea katekizejo.
- Krakovo, Sienna 5, Klubejo de Katolika Inteligentularo, ĉiun duan sabaton, je la 18-a h. - Kultura renkontiĝo.
- Lodzo, Sienkiewicza 60, kapelo de S. Kristoforo, ĉiun kvaran dimanĉon, je la 12-a h. - Esperanto diservo, kaj, poste, amika kunveno en katekizejo.
- Nowy Sącz, paroĥejo de la Plej Sankta Koro de Jesuo, en katekizejo de Patroj Jezuitoj, ĉiun lastan mardon je la 18-a h. - Amika renkontiĝo de esperantistoj.
- Sosnowiec, Orla 15, kapelo de S. Tomaso, ĉiun trian dimanĉon, je la 15-a h. Esperanto diservo, kaj, poste, amika renkontiĝo en tiea katekizejo.
- Tarnovo, Krasickiego 9, Patroj Filipanoj, ĉiun ĵaŭdon je la 17-a h. - Renkontiĝo kun la Biblio kaj la Eklezio.
- Varsovio, Plac Trzech Krzyży, preĝejo de S. Aleksandro, ĉiun duan dimanĉon, je la 17-a h. Esperanto diservo kaj, poste, kunveno en tiea katekizejo.
- Varsovio, Kopernika 34, Klubejo de Katolika Inteligentularo, ĉiun duan vendredon, je la 18-a h. - Artisma kunveno.
- Wroclavo, Katedralna 4, preĝejo de SS. Petro kaj Paŭlo, je la 17-a h. - Esperanto diservo.

Unuopaj

(Por ĉiu aranĝo, eĉ se plurtaga, oni indikas nur la komencan tagon)

6. 1.80 Spirita pilgrimo al Betlehemo, Tarnów, Krasickiego 9.
12. 1.80 Ekumena renkontiĝo ĉe oblato, Gdańsk, Elżbietańska 1.
13. 1.80 Renkontiĝo kun betlehemaj paŝtistoj, Varsovio, Książęca 21; je tiu aranĝo venos ankaŭ Episkopo W. Miziołek.
19. 1.80 La unua studenta renkontiĝo, Gliwice, par. de S. Mikaelo.
20. 1.80 Pilgrimo al la tombo de p. H. Paruzel, Zabrze, par. de S. Josefo.
27. 1.80 Oblato sub la Hela Monto, Ĉenstoĥovo.
9. 4.80 Spiritaj ekzercoj por la animzorgantoj. Ĉenstoĥovo.

20. 4.80 Ekskurso al Wadowice, la naskiĝurbo de Papo Wojtyła. Renkontiĝo en la tiea preĝejo je la 10-a h. - poste speciala programo.
27. 4.80 Pilgrimo al Piekary Śląskie, renkontiĝo ĉe la tiea baziliko je la 10-a horo.
1. 5.80 Spiritaj Ekzercoj en Pieniężno, klostro de Patroj Verbitoj.
11. 5.80 Renkontiĝo kun la hungaraj Geamikoj.
25. 5.80 Pilgrimo al la sanktejoj en Szczecin.
23. 7.80 Spiritaj Ekzercoj en Gostyń « Święta Góra » - klostro de Patroj Filipanoj. Komenco la 23-an tagmeze kaj fino la 26/27-an de julio. En kadroj de la S.E. okazos la I-a Kongreso de polaj katolikoj, la I-a Kongreso de pola junularo, kaj la I-a infana Kongreseto. Ĉiuj Gastoj estas bonvenaj! Post la S.E. ni havas eblon forveturi al Gdansko je la UEA-Antaŭkongreso.
27. 7.80 Antaŭkongreso de UEA. Dum la daŭro de la Antaŭkongreso, ĉiutage okazados ekumenaj kunvenoj.
11. 8.80 Perpieda pilgrimo de Przemyśl al Kalwaria Paławska.
17. 8.80 Pilgrimo al Lipinski.
31. 8.80 Pilgrimo de Bielsko-Biała al Szczyrk « Kapelo sur Monteto » tra montaro Szyndzielnia kaj Klimczok.
25. 9.80 Ekskurso de S. Katarina al S. Kruco tra montaro « Góry Świętokrzyski.
- 19.10.80 Pilgrimo al Kalvaria Zebrzydowska. Renkontiĝo antaŭ la tiea baziliko je la 9-a horo.

La supra listo de la Animzorgado ne estas ankoraŭ kompleta, ĉar oni ne povas antaŭvidi ĉiujn cirkonstancojn. Pri ĉio detale informas la Frateca Informejo Katolika, Johano Edling, str. J. Krasickiego 9; 33-100 Tarnów, Pollando.

J. Zielonka, Pollando

NI DANKAS

Donacis monon al IKUE:

Aŭstrio: Casar, Jauk; *Francio:* Amouroux, Cuvelier Delasus, De Baillicourt, Vernin L., Vernin P.; *F.R. Germanio:* Cremer, Hartmann, Westhoff; *Hispanio:* Pi; *Italio:* Cadei, Ceccarelli, Dao, Di Prinzio, I.P., Jacobitti, Magnani, Monacelli, Neri Lami, Ruaro, Scalabrella, Serratrice, Sicilia Nostra, Tursi.

Donacis Esperantajojn al IKUE:

Aŭstrio: Mudrak; *Ĉeĥoslovakio:* Laube, Marček; *F.R. Germanio:* Kondor; *Italio:* De Salvo, di Tocco, Jacobitti, Venezia; *Nederlando:* Tuinder (agado « Lumo por Kamerunio »), Moerbeek; *Pollando:* J.S.

Al ĉiuj donacintoj, multajn dankojn.

Landaj reprezentantoj de IKUE

Oni pagu la abonkotizon al la landaj reprezentantoj, samtempe avertante pri tio la Centran Oficejon (por ke tuj estu en ordo la ekspedo de la revuo). La jara kotizo de membro-abonanto estas 20 svisaj frankoj aŭ egalvaloro. Pro la daŭra ŝanĝigo de la kurzoj de valutoj, precipe de svisa franko, la sube indikitaj egalvaloroj havas nur informan celon.

Argentino

P. Bruno Ostropolski
Av. Libertad, 75
AR - 3360 Obera, Misiones

Aŭstralio

V. J. Timmins
73 Alexandria Parade
Hornsby N.S.W. 2077

Aŭstrio

W. Mudrak
Beatrigasse, 19/9
A - 1030 Wien III - p.k. 105.713
ŝil. 160

Belgio

E. Paesmans
Lange Koepoortstr. 64
B - 2000 Antwerpen
p.k. 000-0414589-11; b. fr. 350

Brazilo

P. Pietro Urbaitis
caixa postal 4421
BR - 01000 S. Paulo, S. P.

Britio

J. Harris
26, Dare Road
Birmingham B23 6PD
br. p. 6

Ĉeĥoslovakio

Aleš Berka
Na Vyhlídeč 1002, p.s. 28
CS - 755.01 Vsetín

Francio

P. R. Degrelle
11, cours Léopold
F - 54042 Nancy Cedex
p.k. 2555 38 L, Nancy
fr. fr. 52

F. R. Germanio

J. Kondor
Alte Schloss-Str. 25
D - 545 Neuwied 21 - Engers
p.k. 113726 - 673, Ludwigshafen
Rhein; gm 24

Hindio

P. O. M. Lucas, ofm Cap.
Shanti Ashram, Gandhipuram
Coimbatore 641012

Hispanio

Miguel Martínez
Av. da San José 105, pral 3a
Zaragoza - pes. 850

Hungario

P. Lajos Köbor
Fő u. 58
H-9365 Dénesfa

Irlando

P. J. O'Reilly
«Monksilver», Howth Summit
Co. Dublin

Islando

Torfi Ólafsson
Melhaga, 4 - 121 Reykjavík

Italio

P. Duilio Magnani
Viale C. Zavagli, 73
I - 47037 Rimini (Forlì)
p.k. 28/19956 (UECI) -
lir. 10.000

Japanio

Hatirō Matubara
Namimatu-tyō 4/5
596 Kisiwada-si, Oosaka-hu

Jugoslavio

P. Prof. Franjo Gruić
Strossmayerov trg, 5
YU-54400 Džakovo
din. 200

Kanado

P. Proulx
790, 80-ème rue Est
Charlesbourg 7 Québec
G1H 1A9

Kolombio

L. E. Palacios Toral
Apartado aéreo 12-03
Cartagena

Suda Koreo

P. Kiseng Kim
I.P.O. Box 2752 - Seoul

Luksemburgio

H.J. Kindler
1 A, rue des Bains - p.f. 628
p.k. 5088-44
Luxembourg

Madagaskaro

Eugène Ravelosoa
Vata Paositany T27
Antanarivo

Meksikio

P. J. M. Claramunt
Apartado postal 318
Oaxaca, Oax

Nederlando

S. P. Smits
Dunantstraat, 164
NL 2713 VC Zoetermeer
p.k. 685124 - gld 25

Norvegio

S. Murak
Semsavn 166, N - 1370 Asker

Nov-Zelando

J. Hamvai
29 Arran St.
Avondale, Auckland 7

Pollando

P. J. Gotter
Trzebnice 113
PL-59.312 Chocianowice

Svislando

P. Scherer - Graber
Erlen-Str. 58
CH - 6020 Emmenbrücke/Lu
sv. fr. 20

Tajlando

P. M. Perray
GPO Box 1846 - Bangkok

Tajvano/Formozo (Ĉinio)

P. J. B. Se Cien Kao
P.O. Box 1269
Taipei 100, Taiwan R.O.C.

Urugvajo

R. Zeballos Morales
Av. Centenario 3099, C., Ap. 805
Montevideo

Usono

H. S. Corlett
7605 Winona Lane
Sebastopol, Ca 95472
us.dol 13

Centra Oficejo

IKUE, via Berni 9
I - 00185 Roma (Italia)
tel. (06) 7588388
poŝta konto 23290000





ALIĜILO STOKHOLMO

Kongresnumero
Dato de ricevo

Por la administracio

65a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

de la 2a ĝis la 9a de aŭgusto 1980, en Stokholmo, Svedujo

Konstanta adreso: Universala Kongreso de Esperanto, Nieuwe Binnenweg 176,
3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Poŝtĉekkonto de la Kongreso: n-ro 627337 (nederlanda), aŭ

Banko de la Kongreso: Amsterdam-Rotterdam Bank, Rotterdam, n-ro 42.69.01.444.

Mi aliĝas al la Kongreso laŭ la kondiĉoj
presitaj sur la dorsa flanko. Mi sendas
la pagon laŭ la apuda specifo al:

per poŝtmandato/poŝta ĝiro/banka ĝiro
/banka ĉeko*

Mi ne povas jam aliĝi pro pasportaj aŭ
transpagaj problemoj. Mi promesas
pagi tuj post alveno en la kongresejo.

Kotizo (en kategorio)
Adopta Kaso . . .	} (Libervolaj donacoj)
Blindula Kaso . . .	
Literatura Kaso . . .	
Adoptaj Gepatroj . . .	
Bankkostoj
Entute

S-ro/S-ino/F-ino/ (forstreku la nevalidajn)

Nomo (kompleta, por Adresaro).....

Nomo (familia aŭ ĉefa, por alfabeto ordigo).....

Kompleta poŝta adreso: nacilingve en latinaj literoj kun poŝtkodo ĝuste lokita

Lando (en Esperanto).....

Naskiĝdato (nur por studentoj, junuloj kaj infanoj)

Nomo de edz(in)o, kiu jam aliĝis aŭ aliĝas samtempe (aparta aliĝilo)

Dato de tiu ĉi aliĝilo...../...../..... Subskribo.....

Por uzo de la administracio

UEA-membreco: kotizo de ricevita por la jaro

Konfirmo de la C.O.: Konfirmo de peranto:

Pago ricevita	Konfirmilo sendita	Statistikita	2a Bulteno sendita	Kongreslibro sendita
---------------	--------------------	--------------	--------------------	----------------------

* Forstreku la nevalidajn. Pagante internacie per banko aŭ ĉeko, bv. aldoni 5 gld. pro la bankkostoj.

Kongreskotizoj en guldenoj, ĝis: periodo:	79.12.31 unua	80.03.31 dua	80.06.20 tria	80.08.09 lasta
1. Kongresano ne membro individua de UEA.	170	187	204	240
2. Kongresano individua membro de UEA kun Jarlibro.	148	165	182	218
3. Kongresano individua membro de UEA kun Jarlibro kaj revuo	115	132	149	185
4. Edz(in)o de kongresano en kategorio 1.	119	131	143	179
5. Edz(in)o de kongresano en kategorio 2 aŭ 3	104	115	127	163
6. Junulo ĝis inkluzive 20-jara	51	56	61	97
7. Plentempa studento ĝis inkluzive 30-jara	85	93	102	138
8. Blindulo.	68	75	82	118

- * La kongreskotizo ne inkluzivas loĝadon, ekskursojn aŭ bankedon. Pri tiaj aferoj aperos informoj kaj mendiloj en la Dua Oficiala Bulteno, kiun aliĝintoj ricevos en februaro aŭ marto. Frua aliĝo helpas kaj la kongresan administracion kaj la aliĝanton, kiu tiel havas eblecon ĝustatempe fari siajn mendojn ĉe la Kongreso.
- * Por la limdatoj kaj aliaj kondiĉoj validas la dato de la pago. Aliĝilo estos traktita nur post ricevo de la kompleta pago.
- * La kongreskotizo ne estas repagebla, eĉ se la aliĝinto poste ne partoprenas la Kongreson. Pagante kongreskotizon por alia persono, oni tion antaŭvidu.
- * Kongresaliĝo ne estas transdonebla al alia persono.
- * Estas nepre malavantaĝe kotizi en kategorio 1 aŭ 2. Oni ricevas pli kontraŭ proksimume la sama pago se oni estas membro-abonanto de UEA.
- * Kongresano en kategorio 1 (nemembro de UEA) ricevas la revuon *Esperanto* dum la tuta kalendara jaro, en kiu okazas la Kongreso.
- * Kongresano en kategorio 2 aŭ 3 devas pagi la membrotizon de UEA antaŭ aŭ samtempe kun la kongreskotizo. Sen tio la aliĝilo ne estos traktita.
- * Kongresano en kategorio 6 devas indiki sian naskiĝdaton.
- * Kongresano en kategorio 7 devas indiki sian naskiĝdaton kaj sendi kun sia aliĝilo oficialan ateston pri sia studenteco.
- * Kongresano en kategorio 8 devas sendi kun la aliĝilo oficialan ateston pri blindeco de blindula organizaĵo aŭ kuracisto. Gvidanto de aliĝinta aŭ samtempe aliĝanta blindulo rajtas aliĝi senpage, sed ne ricevas la Kongresan Libron.
- * Infano malpli ol 13-jara rajtas aliĝi senpage, se samtempe aliĝas almenaŭ unu el la gepatroj, sed ne ricevas la Kongresan Libron.
- * Ĉiu aliĝanto devas pleniĝi apartan aliĝilon. Se oni ne havas aliĝilon, oni uzu fotokopion aŭ samformatan paperon. Skribu klare – tajpe aŭ presliterere.
- * Sendu la aliĝilon kaj faru la pagon al la sama instanco, prefere al via landa kongresa peranto. Nur se en via lando mankas peranto, sendu la aliĝilon al la konstanta adreso en Rotterdam, pagante al unu el la kontoj indikitaj aliflanke.
- * Pagante por alia persono, nepre indiku klare la celon de la pago kaj skribu la kompletan adreson de la persono, por kiu vi pagas.
- * Personoj kun transpagaj aŭ pasportaj problemoj povas sendi la aliĝilon, sen samtempa pago, al la konstanta adreso en Rotterdam. Tiuj personoj ne estos rigardataj kiel jam aliĝintaj, sed ili havos la rajton aliĝi tuj post la alveno en la kongresejo, pagante tie la kotizon laŭ la tarifo de la unua periodo.
- * Donacoj por la kongresaj fondaĵoj Adopta Kaso, Blindula Kaso, Literatura Kaso kaj Adoptaj Gepatroj povas esti pagitaj samtempe kun la kotizo. Ili estos kvitancitaj en la Kongresa Libro.

Karaj IKUE-anoj ! Iuj el Vi de longe atendas mian respondon je Via letero au plenumo de Via peto. Sincere mi Vin pardonpetas pro mia silento. Certe Vi konjektas, ke amaso da devoj ligitaj kun mia nova laborposteno ne permesis ĝis nun ekkorespondi. Tamen mi klopodos baldaŭ likvidi ĉiujn miajn ŝuldojn tiurilate.

Elkeran dankon al ĉiuj fidelaj sendantoj de p-markeoj !

La malpli atrakciaj estas sendataj al la Knabina Liceo de Fratulinuoj Niepokalanki en Szymanów, kie ekzistas modele funkcia misia komunumo, - kaj la atrakciaj, filatele preparitaj, estas direktataj al s-ano Tuinder en Nederlando por la afrika agado E-3. En tiu tempo ĉiuj sindediĝa p-markeoj okupo helpas al mi vroclovaj samideanoj.

Ĉirkaŭ mil pecojn ni jam sendis, nova nilo estas preparata.

Pro manko de tempo mi ne povos, bedaŭrinde, konfirmadi skribi ricevon de sendaĵoj kun p-markeoj.

S-ano Tuinder varme dankas pere de mi al ĉiuj oferantoj de mi.

Ĉar ni jam profundigis en la novan jaron mi petas ĉiujn, kiuj ankoraŭ ne enpagis la IKUE-kotizon, fari tion kiel eble plej baldaŭ.

La monon direktu nepre laŭ mia nuna adreso. Ne alsendo de la abonpago por nia revuo EK ĝis duono de marto estas por mi same signifa kun resigno pri plua abonado.

Al ĉiuj IKUE-anoj kaj ties familioj mi bondeziras benitan Jaron 1980 !